




Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
Redaktejo: Esperanto * Cargue Sac, F 47470 BEAUVILLE
Unu n-ro : 8 FF. Abono por 1990 : 40 FF ĝirotaj al :
CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk 3371 74M Bordeaux
mencii same sur banĉekoj, dankon! Nia tel.: 53.95.40.26



Estu

Feliĉaj !



Bonan vojaĝon sur la vojo de l'jaro 1990 !

Nova jaro, tio estas kvazaŭ nova vivo kun ties esperoj kaj projektoj. Jen mia plej kara bondeziro :

la 365 tagoj de ĉiu estulo estu himno al la amo !

Ĉar kion fari, kiam ni ne plu povas vidi la sunon leviĝi sen pensi, ke por multaj homoj ĝi brilas sur ruinoj ?

Kion fari, se ne AMI tute simple, por ke niaj kunvivantoj faru la samon.

AMI, ĉar kiam la amo ekaperas, la ĉiutagaj gestoj sin ornamas per ĝirlandoj, la arboj ŝajnas pli verdaj, la ĉielo pli blua kaj la tuta mondo pli afabla...

AMI, ĉar kiam la amo malaperas de nia vivo, ni ne plu aŭdas la akvofonton kaj ĝian kristalan kanton, ni ne plu vidas la birdon kaj ĝian sunan bekon, la tuta mondo fariĝas malvarmiga dezerto.

AMI, ĉar sen amo - laŭ la estona poeto LLiev -

"ni estas kvazaŭ mateno sen aŭroro,
ni estas printempo en kiu mankas la floroj;
sen amo, ni estas arbo, kies folioj estas for,
mi estas ĉielo, kie mankas la stela or'..."

AMI, por ke nia planedo finfine ĝuu feliĉigan, serengan pacon...

.....

Karaj gelaŭtuloj, mi proponas al vi la simplajn vortojn de miaj bondeziroj. Prenu ilin, varmigu ilin en viaj manoj. Rigardu kiel ili moviĝas kaj instinkte prenas la vojon al via koro. Malfermu vian pardon : ili amas vin...

Michèle Freud



Ĉu por aŭ kontraŭ familia E-instruado ?!?

URSULA:

Tiu ĉi temo jam ofte trakuris cerbon de Esperantistoj. Ĉefe kiam fondiĝas Esperantista paro, ili demandas sin, ĉu avantaĝas aŭ necesas Esperanto-instruado al nia(j) infano(j)? Junaj paroj ofte hezitas, despli, ĉar de la ekstera mondo ili ne sentas apogon. Male, ĉiam sonas la sama gurdo: "Esperanto ja nur estas artefarita lingvo, kiu poste servos al nenio. Prefere la infanoj lernu en lernejo fremdan lingvon ol perdi sian tempon per Esperanto, kio eĉ malhelpas bone lerni la gepatran lingvon."

La Esperantistaj paroj dubas kelkfoje pri sia instrukapableco aŭ timas riskon ke la infano poste ne povos praktiki la internacian lingvon kun samaĝuloj kaj tiel sin izolas mem. Tiu problemo eĉ povas gvidi la lernanton al forlaso de la lingvo pro elterpiĝo de entuziasmo. Alia kaŭzo povos esti normala reago de adoleskanto kontraŭ siaj gepatroj. Esperanto povus tiukaze esti forĵetita kune kun aliaj hobiaj aŭ manioj de la kontestata patro aŭ patrino. Tiukaze mi ŝatus citi malan efikon: amiko de mi komencis lerni Esperanton sen apogo kaj aprobo de siaj gepatroj. Li despli trovis plezuron spite al la kontraŭa reago de la gepatroj.

La gepatroj aliflanke riskas tedi aŭ naŭzi infanon per trudo de Esperanto. Pri tiu ĉi lasta punkto oni povas havi diversajn opiniojn. Ĉu vere temas pri trudo de Esperanto, kiam oni ĝin aplikas hejme? Oni ne povas demandi al bebo ĉu ĝi deziras lerni Esperanton aŭ ne. Same, ĝi ne povas komuniki al ni sian opinion koncerne la nacian lingvon. Tiumaniere ĉiuj gepatroj nerekte trudas al siaj beboj la nacian lingvon. Eble franca bebo dezirus lerni la anglan aŭ germanan aŭ ion ajn se ĝi havus la mensan kapablon de plenkreskulo. Sed normale, ĝi lernas la francan, ĉar ĝi vivas en Francio.

Al mia demando, kial mia patro neniam instruis al mi Esperanton denaske, li respondis, ke neniam li volis trudi ĝin al mi. Li deziris, ke mi mem decidu, ĉu utilas al mi aŭ ne. Despli granda la ĝojo, kiam lia 17-jaraĝa filino petis de li lernolibron. Fakte tio nur okazis post vizito de kongreso, kie mi miris pri la facileco de interkomunikado inter diversnaciaj homoj. Rezulte mi tamen iom bedaŭras, ke mi ne pli frue komencis lerni, sed ĝuste mankis al mi internaciaj kontaktoj por pruvi al mi la neceson de E-o.

Tio estas vunda punkto de la esperantistaro. Mankas renkontiĝoj aŭ interŝanĝoj por infanoj, kie ili povas komune ludi, ridi, kanti, sperti varmajn kontaktojn kaj trovi entuziasmon daŭrigi, ĉar ĝuste tion oni bezonas. Tiam verŝajne ne tiom da denaskaj E-istoj forlasus la internacian lingvon. Por reveni al la devigo aŭ nedevigo: Marcel kaj mi instruas al niaj du filinoj E-on. Kial? Ĝuste ĉar ni sentas la bezonon. E-o estas nia hejma ĉiutaga lingvo. Mi, kiu venas el Germanio kaj ne sufiĉe bone parolas la francan, sentus min nek komforta nek spontana, se hejme mi devus paroli lingvon, en kiu mi pli-malpli povus elturniĝi, sed kiu ne estas natura, kaj alportas multajn lingvajn barojn. La sama okazus al Marcel koncerne la germanan. Do ni hejme parolas E-on inter ni. Kun la infanoj germane kaj Marcel E-on. La francan ili lernas ekstere.

Mi ne nur citu la negativajn aspektojn, ĉar abundas pozitivaj vidpunktoj: por infano la gepatroj estas la ĉefaj rilatpersonoj. Tiumaniere la gepatroj povus profiti uz E-on hejme. Ĝis la enlernejiĝo la infanoj ja daŭre vivas kun la gepatroj kaj uzado de E-o povus esti la plej fekunda tereno.

Tamen oni devas konstati, ke ne en ĉiuj paroj ambaŭ membroj parolas kaj praktikas E-on. Relative ekzistas malmulte da paroj en kiu edzo varbis definitive la edzinon aŭ reciproke. Jes, partneroj eĉ kontraŭas kaj malhelpas la E-pasion de sia kunul(in)o. Aliaj toleras, aŭ eĉ aprobas, sed ne entuziasmiĝas, ke la infanoj lernu E-on. Plej ofte oni ja toleras la esoerantistecon de edz(in)o kun foje nuanco de kompato, se ne de malsato. En tia kazo la tereno ne estas tiom fruktodona por lernigi E-on al infano.

Post tiuj pozitivaj kaj negativaj aspektoj ni konsideru la ĝis nunajn rezultojn kaj la sintenon en la estonteco.

Ĉu efektive restas multaj denaskaj E-istoj? Verŝajne pluraj

inter ni memoras pri ekzemploj de infanoj de eminentaj E-istoj, kiuj ne heredis la kulton al la verda stelo. Aŭ ili tute ne komencis lerni aŭ ili ĉesis pro seniluziigo.

Pro tio la E-istaro devas krei favorajn kondiĉojn, por ke la infanoj spontane kaj ne trudite havu la eblecon praktiki E-on en feriejoj, E-renkontiĝejoj, somerumejoj pere de ludoj. Ĉar fakte ĝis nun ekzistas kongresoj por plenkreskuloj, junularrenkontiĝoj por gejunuloj ekde 14 jaroj, sed por la infanoj malplena kampo. Ekzistas jam familiaj renkontiĝoj en La Chaux de Fonds, kiujn cetere ne ĉiuj familioj finance povas permesi al si. Necesas ankoraŭ mencii la "Rondo de la E-istaj Familioj". Temas pri reto, al kiu aliĝis E-familioj el la tuta mondo. Ilia komunikilo estas cirkulero, en kiu oni pritraktas ekzemple: familiajn vortojn, kiuj ne ekzistas, sed necesas por la ĉiutaga vivo. Oni ankaŭ instigas al verkado kaj traduko de infankantoj, ludo, rakontoj... cetere ĝi servu kiel komunikilo de gepatroj kaj interŝanĝoj de ideoj. Ĝis nun la Rondo (sidejo ĉe Renato Corsetti en Italio) organizas unufojon jare renkontiĝon en Hungario. Tamen la distanco ne tiom favoras por multaj.

Eble iam ni sukcesos organizi familian renkontiĝon en la muelejo de Beauville...?

ĴANSEB : Esperanto ne prestiĝas por infanoj

Mi provis lernigi esperanton al miaj tri filinoj. Vane.

La unuan mi kunprenis al E-kongreso. Ŝi revenis kun esperantisto, sed sen unu vorto de nia lingvo. Krome, ŝi ne plu volas aŭdi pri ĝia lernado.

Al la dua, petanta de mi iun favoron, mi respondis : Jes, sed kun unu kondiĉo: lernu aŭ liston de anglaj neregulaj verboj aŭ esperantan konjugacion, laŭ cia elekto. Ŝi unue decidigis por la angla, sed, vidinte la longecon de tiu ĉi, finfine preferis la esperantan. Por la simplaj formoj, ĉio iris glate, sed por la kompleksaj ŝi ne komprenis la utilecon. Kompatema al ŝiaj suferoj, mi ĉesigis la turmenton. Al la tria mi klarigis, per ekzemploj, la principojn de la E-gramatiko. Ĉar ŝi estas tre logika, ŝi tuj komprenis kaj eĉ faris respondojn antaŭ miaj demandoj. Sed ŝi baldaŭ seninteresiĝis pri la afero.

Por infanoj Esperanto estas nur gepatra fantaziaĵo. Ili povas lerni ĝin en la frua infaneco, sed baldaŭ konstatas, ke ĝi alportas al ili neniom da prestiĝo apud iliaj gekamaradoj. Male, ili sentas sin malsamaj ol la aliaj kaj foje eĉ apudmetitaj. Je tiu aĝo, estas tre grave por junulo, kiu malkovras grupvicon.

Jen demando: kiel igi esperanton pli prestiĝa por infanoj? Kiel organizi renkontojn, pri kiuj ili parolos entuziasme, kiam ili revenos hejmen, kaj kiuj instigos iliajn amikojn esperantistiĝi?

Mi ne konas la solvon. Eble multobliĝo de renkontoj, kie la infanoj kaj la geedzoj estus speciale bone traktataj, povus helpi la aferon.

GAROLO (por kelkaj Esperantistoj, la tro konvinkita homo!):

Tiu 33a ĉenletero de **Laŭte** estas aparte grava, kaj la temo estas neelĉerpebla, kvankam Ursula prezentis la esencon de la problemoj (falsaj problemoj). Same kiel Ursula kaj Marcel, mia edzino kaj mi antaŭ 36 jaroj fondis familion, kie la hejma lingvo estis kaj ankoraŭ estas Esperanto. Komprenoble, intertempe la tri idoj, kiuj devige travivis la fenomenon Esperanto, forflugis el la nesto! Mi tamen sentas, ke apartenas al mia devo, transdoni iom el tiuj spertoj al la legantoj de **Laŭte**, sendepende de eblaj opinioj de unu el la cititaj idoj... kiu hazarde aŭ ne, apartenas al la listo de kunlaborantoj en ĉi tiu ĉenletero.

Esperanto, afero de idealistoj.

Ne estas dubo, ke Esperanto estas unue lingvo por idealistoj, kaj nur idealistoj kiuj volas esti veraj mondcivitanoj, sennaciuloj, kapablas adopti Esperanton kiel hejmlingvon... finfine estas afero por pioniroj, kaj aŭtentaj pioniroj ne sin lasas influi de antaŭjuĝoj el la normala socio, ili tutsimple antaŭeniras en siaj konvinkoj, en sia idealo. Ni ne forgesu, ke nur per la formado de tiu mondcivitana popolo Esperanto venkos. Por ekzempligi tiun aserton mian, mi citos leteron el la franca ministrejo pri edukado kaj kulturo, kiun kdo Barkoviĉ montris al mi antaŭ nelonge en la SAT-sidejo. Laŭ la ministro, inter aliaj

argumentoj, oni ne oficiale instruos Esperanton en la francaj lernejoj, ĉar ne ekzistas nacio, popolo, kulturo, kiuj sur la tersurfaco povus praktike pravigi tian instruadon. Oni devas agnoski, ke ne estas la kelke da 100 miloj da Esperanto-balbutantoj dissemitaj en la tuta mondo, kiuj formas popolon. Ne estas la 127 familioj, pli-malpli uzantaj Esperanton en la kadro de sia familio, laŭ la listo de oktobro 1989 de Renato Corsetti/Anna Lowenstein, kiuj konsistigas nacion. Tamen estas ni la esperantistaj paroj, kiuj havas la ĉefan taskon krei la mondcivitanan popolon de Esperantio per la adopto de Esperanto en niaj familioj. Ni ne forgesu, ke la familio estas la unua (por ne diri nura) ĉelo de la socio. Ni ne forgesu, ke la oficialaj instancoj (inter ili la ŝtato) mal-multe helpis la konstruon de la socio, plej ofte la ŝtato detruas, ĉi-supre estas plia ekzemplo rilate al nia lingvo.

Al beboj oni ne lernigas.

Al beboj oni ne lernigas, ne instruas kiel manĝi, paŝi... paroli ktp. Estas la evoluo en la propra vivmedio, kiu lernigas. La beboj, kiel ĉiuj homoj, kiam ili naskiĝas, estas esence "sennaciecaj"; por ili tute ne gravas la nacioj, la lingvoj, la kultoj, kaj ili tute sen problemoj nature sorbas la komunikilojn de la medio, kie ili vivas. Se la gepatroj parolas Esperanton, la unua lingvo de la bebo estas Esperanto, sen la minimuma traŭmato. La psikaj traŭmatoj eventuale aperas poste pro nia aĉa socia nenatura kunvivado... Mia edzino kaj mi do ne lernigis, ne instruis Esperanton al niaj infanoj... sed, ĉar ni uzis Esperanton kiel familian lingvon, niaj infanoj unue, sen-konscie parolis en Esperanto. Ĉu poste ili lernis la gramatikon, la legadon kaj skribadon de Esperanto, tio estas afero, kiu koncernas nur ilin.

Esperanto-parolanto ne devige estas Esperantisto.

Evidente, kiam la infanoj kreskas kaj fariĝas memstaraj en pensado kaj agado, ankaŭ pro la naturaj konfliktoj inter la generacioj, ili perfekte povas malakcepti la "idealon", la "doktrinojn" kaj ĉiuspecajn strangaĵojn de la gepatroj, inter ili estas Esperanto. Ni devas konfesi,

ke la esperantistoj ĝenerale ne agas normale, ili sin surŝutas per verdaj flagoj, steloj, Zamenhofaĵoj ktp, kio ne ĉiam plaĉas al niaj heredantoj, kiuj celas heredi "normalan" vivon, eĉ se ankaŭ ties normala ŝabloneco estas falsa kaj artefarita en nia sociordo. Sendube niaj karaj denaskaj esperanto-parolantoj rajtas malakcepti la esperantistecon de la gepatroj.

Tiam vi demandos, ĉu ĉio tio rezultas je nenio? Ĉu ne estis perdita tempo? Estas facile konstati, ke la semoj, la mikroboj ks. neniam plene perdiĝas. Ekzemple, mia unua filino, kiu nuntempe suferas, pro tute personaj motivoj, profundan mensan jukadon, alergion rilate al Esperanto, ankoraŭ kunlaboras ĉe **Laŭte** kaj jam verkis originalan romanon en Esperanto. Mia filo, kiu rifuzas esperantismon, antaŭ nelonge, por ne perdi la vole-nevole akiritan lingvon, en kelkaj kvaronhoroj lernis la gramatikon kaj skribadon de Esperanto... kaj li insistas uzi Esperanton kiel sekretan komunikilon kun mi. Mia tria infano (preskaŭ 30-jara filino) ne-sekrete sekretarias miajn proprajn skribaĵojn en Esperanto. Konklude:

Vivu la uzo de Esperanto en familiaj rondoj!

PATRIKO:

FILO DE KOMUNISTO NE EMAS AL KOMUNISMO

La esperantistoj pekas pro pretendemo. De "Unu Homaro, Unu Lingvo" ili pasis al "Proletoj el ĉiuj landoj, interkompreniĝu!" kaj poste parolis pri "helplingvo", pretekstante ke Esperanto permesu al ĉiuj paroli siajn denaskajn lingvojn, finfine daŭrigante la marĉandadon per nova koncepto "pontlingvo", kiu argumentas, ke Esp-o plifaciligas la lernadon de iu ajn fremda lingvo... Se ili estus agintaj inverse, ili ne estus renkontintaj tian kontraŭecon. Laŭ tiu vidpunkto, Esp-o ne similas al aliaj lingvoj sed ja al ideologioj kaj religioj aŭ al Donkiĥoto luktanta kontraŭ malamikoj de li mem kreataj...

Do ni evitu trudi al niaj infanoj, kiuj ĉiamaniere pri nenio kulpas, la projekciaĵojn de nia nekonskvenceco. Se ambaŭ gepatroj parolas hejme nur esperanton, kompreneble ankaŭ

la infanoj, sed eĉ tiukaze estas pli sana paroli la lokan lingvon ol familian aŭ individuan lingvon, ĉar la funkcio de iu ajn lingvo estas komuniki kun plejmulte da proksimuloj laŭ leĝo de neceseco. La neceso de Esp-o estas nur teoria sed ne praktika.

Mia hejmo estas dulingva: franca kaj portugala. Mi konis mian edzinon en Brazilio, kiam ŝi ne sciis la francan kaj mi jam sciis la portugalan. Do ni komunikis nur portugallingve kaj eĉ post kiam ni translokiĝis al Parizo. Paroli france inter ni ne estas nature kaj ankaŭ ne dezireble, ĉar ni perdus la praktikon de la portugala kaj ankaŭ la filo, kiu parolas france kun ĉiuj krom la patrino, kiun li alparolas portugale. Do ni trudus al li la paroladon sed ne la komprenon de la portugala lingvo, kiun li jam posedas pro tio ke ni komunikas nur portugale. Kaj gravas, ke li ankaŭ parolu kaj ne nur komprenu la patrinan lingvon. Se ne tiel, li neniam parolus pro kutimo ne paroli.

Kompreneble Esperanton mi ne instruas al li, ĉar tio estus fantazia kaj kripliga. Post kelkaj jaroj li povos lerni fremdan lingvon, probable la anglan, ĉar tiu okupas la lokon, kiun Esp-o ne okupas.

INFAN-RENKONTIĜO

Estas proponata en la muelejo de Beauville unusemajna renkontiĝo de infanoj, por ke ili kune uzu Esperanton dum ĉiuspecaj aktivecoj (lekz.: naĝi, kuiru, promeni, teatri, kanti, skribi kaj eldoni revueton...) kaj ludoj (leksteraĵoj kaj internaj). La celo estas kiel eble plej nature eklerni la lingvon kaj alkiutimiĝi al ĝia ĉiutaga uzado. Kompreneble, plej bonvenaj estas ankaŭ la infanoj, kiuj jam konas Esperanton.

La restadkosto ne estas fin-deciditaj - sed estos kiel eble plej malaltaj : ĉirkaŭ 40 FF tage. Eblos ankaŭ, por tiuj kiuj venos familie, tendumi kaj elturniĝi aparte. Se la ideo plaĉas al vi, bonvolu skribi al la muelejo, menciante la datojn, kiuj plej taŭgus por vi (en julio aŭ aŭgusto ĉi-jare) kaj viajn eventualajn sugestojn.



VORTOJ DE MALJUNULO

— — —
valo
— — —

Ĵaŭdo 23a de novembro

estis por mi belega dato.

Post plurtaga pluvado, matene leviĝis brila varma suno. En la ĝardeno arde ruĝis la geranioj, kaj la rozoj, kiuj ankoraŭ floras en tiu ĉi aŭtuno, triumfe malvolvis siajn korolojn.

Kaj venis duopa vizito de karaj geamikoj: Deniza Castelló, de Béziers, kaj nia bona Kribo, de pli fora Aĝenio. Ni pasigis horon en sunlumo sur la teraso, poste kune tagmanĝis, kaj longe esperantumis, elvokante karajn rememorojn kaj traktante nunajn demandojn.

Poste, bedaŭrinde okazis drameta akcidento, kiu momente timigis nin: Deniza svenis kaj falis. Tuj intervenis du diligentaj flegistinoj, kaj post kelkminuta ripozo sur lito nia amikino leviĝis, kaj ŝajnis resaniĝinta. Mia edzino proponis, ke ŝi tranoktu ĉe ni en la urbo, sed ŝi nepre volis rehejmiĝi kiel planite. Du horojn poste ŝi trankviligis nin per telefonvoko el sia hejmo. Ni esperas, ke ne estos sekvo al tiu momenta malsaneto, kaj ke ni povos konservi el la memoro pri tiu tago nur la tre agrablan parton.

Niaj geamikoj ĝojis vidi min marŝi facile kun la kvarpieda "deambulatoro", kaj malpli lerte kun paro de "anglaj" lambastonoj, freŝdata akiro. Marŝado estas ankoraŭ dolora, sed la kineziterapeŭto diris: "Normale. Dum kelka tempo, ju pli vi apogos vin sur la akcidentita membro, des pli ĝi doloros.". Ĉarma perspektivo! Sed tio estas necesa.

Plurfoje, en noktaj sonĝoj, mi marŝis, kuris, grimpis,

saltis, plongis, naĝis. Matene, je vekigo, mi retrovis min kun mia dumtempa kripleco. La faktoj estas obstinaj. Ili trudas al mi realismon. Kaj paciencon.

Iam, esperinde, mi forgesos tiun malagrablan provtempon. Sed mi longe ĝojos pri tiu benita 23a de novembro.

Sciencistoj kaj Dio

Mi relegis la libron de Andreo Lorulot: "**Kial mi estas ateisto**". Aparte retenis mian atenton la ĉapitro pri kredantaj sciencistoj. Grandaj pensuloj, kapablaj pri plej raciaj rezonadoj, obstine rifuzis pensi pri tabuaj temoj. Ili prefere rifuĝis en kokono de trankviliga malracia certeco.

Paskalo senkontrolite akceptis plej absurdajn dogmojn. Pasteŭro depostulis la "kredon de karbisto". Cuvier kredis pri Dio kreanto. Eble tial li ne povis elpensi la fruktodonan hipotezon pri evoluado. J.H. Fabre vidis la manon de Dio en etaj insektoj, la grandega Ejnŝtejn en la kvardimensia makrokosmo kaj en la ne senpere explorebla mikrokosmo de la nukleo. Li vane uzis multe da tempo en la serĉado de unika formulo, kiu klarigus la tutan universon.

Ankoraŭ nun eminentaj sciencistoj estas kredantoj: prof. Grassi, Louis Leprince-Ringuet... Aplikante rigoraajn sciencajn metodojn, ili efektivigas belajn laborojn en siaj respektivaj fakoj. Tuj kiam ili eliras el ili, ilia fruktodona efikeco steriligas.

Oni estas aŭ sciencisto aŭ kredanto. Aŭ sciencisto kaj kredanto. Oni ne estas kredanta sciencisto. La scienco ne kredas. Ĝi observas, esploras, pesas. Ĝi forĵetas eluzitan hipotezon por pristudi novan. La kredo sendiskute asertas, kaj dekretas definitivan veron.

Tiuj sciencistoj, kiuj rezignas pri scienco, rezistas al sia natura inkliĉo, kaj malespere serĉadas veron ekster la scienco, mi interpretas ilian sintenon kaj ilian reagon kiel ian fuĝon antaŭen.

Progreso

En 1953 mi estis estro de la labormetoda fako en la firmao Benoto, kiu fabrikis levaparatojn kaj fosmaŝinojn. Mi enkondukis en ties uzinon la tornotranĉilojn kun surmetita plateto el karbido de volframo, kiuj estis jam disvastigitaj en la franca metalindustrio, sed tie ankoraŭ nekonataj.

Komence la tornistoj, spertaj laboristoj, akiris tiujn ilojn laŭ la maniero al ili kutima. Mi pacience klarigis al ĉiu el ili aparte, ke tiu maniero, perfekte konvena por la iloj el "rapida ŝtalo", tute ne konvenas por la novaj iloj kun volframkarbido. Ke tiuj iloj oni devas uzi tiaj, kiaj oni ilin ricevas, aŭ laŭbezzone reakrigi sen ŝanĝi la formon de ilia tranĉrando. Ke tiel oni povas (kaj devas) pliiĝi la tranĉprofundon kaj la translacian rapidon, kaj tiel oni ricevas pli dikajn metalrubandojn, bluaj, eĉ ifoje ruĝaj pro la eligita varmo, kaj ŝparas tempon en la tornado. Mi aldonis, ke tiuj iloj estas pli multekostaj ol la antaŭaj, ke ni aĉetas ilin, tial ke la tempoŝparo pliiĝas la profiton de la mastro, kaj tio estas justa. Sed estas same juste, ke ankaŭ la laboristo ricevu profiton, per plialtigo de sia rendimenta premio. Kelkaj restis skeptikaj:

- Ni konas la muzikon. Kiam iu nova metodo aŭ tekniko ŝparigas tempon, baldaŭ oni reduktas la al ni asignitan tempon, kaj nia profito nuligeblas.

- Mi estas tie ĉi por kontraŭi tian malhonestan procedon. Tiel longe, kiel mi estos estro de la labormetodoj, mi zorgos pri tio. Fidu al mi.

Iom post iom ili estis persvaditaj. La laboristoj ja ne estas stultaj. Ili komprenas simplajn rezonadojn bazitajn sur konkretaj spertoj. Post malpli ol du monatoj la veto estis gajnita, la volframkarbidaj torniloj estis definitive adoptitaj.

*

Nun, kial mi rakontis tiun ĉi banalan anekdoton el mia profesia sperto?

Tial ke mi vidas rilaton inter la volframkarbido en komparo kun la rapida ŝtalo, kaj la lingvo internacia

en komparo kun la naciaj lingvoj.

Ankaŭ per esperanto oni ŝparas tempon, kaj oni ricevas pli bonajn rezultojn el ĝia rapida lernado ol el longa penado por akiri kelkajn elementajn nociojn pri iu fremda nacilingvo.

Kiel do ni tiel malfacile persvadas niajn samtempanojn? Tial, miaopinie, ke sur tiu grundo ni renkontas pli obtuzan rutinemon ol ĉe la tornistoj de Benoto. La homoj estas propravole (eĉ se nekonscie) surdaj al niaj argumentoj kaj blindaj al evidentaj faktoj. Oni gurdas al ili, ke esperanto estas mortinta, kaj ke la usonangla lingvo estas la panaceo, la vera lingvo internacia. Kaj ili kredas pri tio, kiel ili kredas pri la belaj legendoj de la Sankta Biblio aŭ de la Nobla Korano.

La laboristoj havas opiniojn bazitajn sur spertoj. Se nova sperto alportas progreson, ili baldaŭ akceptas modifi sian opinion. Sed kiam temas pri neracia kredo, la afero estas multe pli malfacila. Ni sciu kaj konsciu, ke la vojo estas longa, ofte spita: ni do ne perdu la kuraĝon. Ni konservu en memoro la poemon de Zamenhof "La Vojo", kaj ĝian konkludan admonon: "Obstine antaŭen!"

Saĝo de maljunuloj

Oni ofte opinias, ke maljuneco igas la homon saĝa: aĝo kaj saĝo facile rimas.

Ni prenu du famajn ekzemplojn el la freŝdata historio: Ĥomejni kaj Deng Xiaoping, pli ol okdekjaraj. Eĉ de Gaulle estis apenaŭ malpli aĝa, kiam en 1968 li intencis ordoni al armeo ataki la ribelan junularon; li rezignis, kiam generalo Massu, kiu tamen ne estis milda pacisto, avertis lin, ke probable la soldatoj malobeus. Bedaŭrinde la veteranaj generaloj de la ĉina "popola armeo" ne estis tiel prudentaj, kaj la soldatoj, komence fratuminde kun la manifestaciantoj, fine pafis al ili per kanonoj kaj mitraloj, kaj premegis ilin sub siaj kirasĉaroj. Ho ve! tro ofte eĉ pacema homo, kiam li tenas armilon en la manoj, facile fariĝas murdisto.

Ĝis kiam maljunuloj, frenezigitaj de sia senmezura potenco, obstine kroĉigos al ĝi, kiu diktos al ili pli kaj

pli kruelajn decidojn? kaj ĝis kiam la popoloj ne trudos al tiaj maljunaj frenezuloj sufiĉe fruan emeritiĝon? ke ili kultivu sian ĝardenon, kaj lasu la publikajn aferojn al pli junaj...

Finskribinte tiun ĉi paĝon, mi kredas aŭdi iun, kiu frustras al mia orelo: "Sed Napoleono kaj Hitlero ne estis tiel maljunaj..."

Ja vere... Kaj nun mi hezitas konkludi. Eble ne la maljuneco mem, sed la potenco difektas la homan naturon, kaj faras el homo krimulon?

90

Jen alvenas la 90a jaro de tiu ĉi jarcento, tiom riĉa je mirindaj inventoj, je prestiĝaj efektivigoj, sed ankaŭ je katastrofoj kaj krimoj kontraŭ la homaro kaj kontraŭ la naturo.

Ankaŭ mi atingos, precize en februaro, tiun respektindan aĝon...

Ĉu respektinda? Ĉu pro nura granda aĝo homo meritas respekton?

Fripona maljunulo estas nur maljuna fripono.

Stulta maljunulo estas maljuna stultulo.

Kaj pro ilia maljuneco oni devus ilin respekti?! Tute ne, certe!

Pri respekto rajtas ja sindona malegoisma junulo, kiu senkalkule dediĉas tempon kaj forton al iu alta idealo, al iu nobla afero, senzorge pri propra profito.

Respekton oni ŝuldas precipe al infano, kiu malfermas klarajn okulojn al la mondo, trovas ĉion bela kaj bona, fideme ridetas al ĉio kaj al ĉiu, kun pura koro, senkulpa. Ni respektu tiun purecon kaj senkulpecon, ni zorgu ne difekti kaj korupti ĝin per nia malico kaj perverso de tro spertaj plenkreskuloj. Ni lasu ĝian naturon libere elvolviĝi; se iajfoje ĝi bezonas, ke ni gvidu ĝiajn paŝojn, ni faru tion plej delikate kaj malpeze, por ne misinflui la harmonian floradon kaj kreskadon de ĝia originala individueco.

Resume :

Ni respektu homon, se li/ŝi meritas respekton.

Ni respektu infanon, ĉar ĝi ĉiam meritas respekton.

Ni ne respektu maljunulon, se li/ŝi ne meritas respekton.

Unu plia - unu malplia

"Sennaciulo" de novembro informas pri la morto de kdo Miyamoto Masao. Grava perdo por la movado en Japanio kaj por la tutmonda esperanta literaturo entute.

Miyamoto, interalie, konigis al ni iom el la riĉa japana poezio, tiel kontribuante al elvolvado de tiu sennacieca kulturo, kiu sin nutras el la fontoj de ĉiaj naciaj kaj etnaj tradiciaj kulturoj.

Li estis jam maljuna, tamen malpli ol 80-jara. Cetere, je kia ajn aĝo, tiaj homoj ne devus morti, ĉar ili restas mense kaj kore junaj, kaj konservas nevelkan talenton. Mi pensas pri nia Barthelmes, pri nia Bannier, modelo de modesteco, kiu malmulte verkis, krom antaŭparoloj por alies libroj - sed lia konversacio restis brile vigla kaj sprita. Mi pensas, inter la vivantoj, pri nia Waringhien, daŭre klera kaj sprita. Miyamoto apartenis al tiu sama klaso de verkistoj. Freŝdate aperis lia lasta libro "Japanaj vintraj fabeloj", aĉetebla ĉe SAT. Ĉu laste ? Ĉu inter lasitaj paperoj oni ne eltrovos iun novan manuskripton indan je postmorta eldono ?

Li jam ne estas inter ni, sed li pluviwas en sia verkaro. Ĝin relegante ni retrovos lin. Mortis Miyamoto la homo. Vivu Miyamoto Masao la verkisto !

Omaĝo al mortinta damo

Daŭre plilongigās la funebra listo de forpasintaj geamikoj. Freŝdate mortis Margareta Schwartz. Tiu nomo elvokas nenion al la junaj generacioj. Sed la veteranoj, kiuj vivis en Parizo en la jardeko 1920-1930 bone memoras pri la voĉo kaj la impeta temperamento de la blonda "Marga Rineta", kiu, kune kun sia edzo, nia karmemora Raymond Schwartz, animis la gajajn vesperojn de la Verda Kato. En la mezo de la jarcento retroviĝis ĉe la Koboldoj en Montmartre la kanzonista paro, ĉiam pli vigla, ĉiam sprita, "sub la signo de gaja muzo".

Nun li, kaj poste ŝi, estas malaperintaj. Raymond Schwartz okupas tute apartan lokon en la esperanta literaturo. Per sia originala stilo, "kun siaspeca spico", li

longe pluvis en siaj presitaj verkoj. Sed por tiuj, kiuj
ŝin konis, ankaŭ Marga ne estos forgesita.



BILANCO 1989

Abonoj + donacoj 15819,40 . Jara saldo : - 3280,32
Eldonkostoj : 15462,50 Antaŭa saldo : 11308,23
Afranko : 3637,22 Nun en kaso : 8027,91

Abonantaro : rekorda kun 421 abonoj (kresko + 2%). Iomete kreskas
la procento da eksterfranciaj abonoj (41%). Dank'al la donacemo de
Laŭtuloj 34 personoj ricevis la gazeton.

Amplekso : Ĉar la jara amplekso de la gazeto kreskis de 324 ĝis 412,
en 6 duoblaj numeroj, kaj ĉar la eldon- kaj sendkostoj senteble plialti-
iĝis, tial ne sufiĉis la 5-franka plialtiĝo de la jarabono. La kaso estas
do deficitita.

Ĉar por 1990 ni ne deziras plialtigi la abonprezon por prefere instigi
ĉiujn fidelulojn de L! membriĝi je AERA per 20-franka kotizeto, supoz-
eble la kasa situacio ne pliboniĝos. Necesos do iom redukti la amplek-
son de la jarkolekto. Se tamen tro abundos la artikoloj, ni devos
flankelasi iujn tradukitajn tekstojn, memorante, ke L! dekomence celis
favori pli la sinesprimadon de abonantoj, ol ilian tradukemon.

Speciala bilanco por nia renkont- iĝejo


Donacoj : 18 759 FF + 1000 DM (don.
Elspezoj : 13 789,95 de E.B.)
Saldo : + 4969,05 FF + 1000 DM

Spezoj de Amika E-Rondo Aĝenia

Vendoj + Kotizoj : 2813 Jara saldo : - 476
Aĉetoj : - 3289 Antaŭa saldo 3883,87
Nova saldo en kaso : 3407,87

Adiciante tiujn, kiuj pagis apartan kotizon al AERA kaj tiujn, kiujn ni
konsideras membroj pro ties monhelpo, ni trovas ĝis nun ĉ. 150 anojn.
Dankon!

Bertrando ALBAULT
Prezidanto de EUROKKA
Esperanto Redakcio
Radio FMR
9 bis av. Frédéric Estèbe
F-31200 TOULOUSE



Responde al la artikolo de Rejal en Laŭte n°83

Kial fari la ludon de la registaroj

aŭ
Dividi por regi

Tute ne estas iluzio kredi ke naciaj registaroj oficiale akceptus Esperanton: tio estas
nur pura senkonscio! Ĉar necesas unue kompreni ke ĉiuj potenculoj taksas veran internacian
lingvon malamiko!

Registaroj jam formortigis multajn Esperantistojn (tria raiŝo, Sovetunio, Irano). Aliaj
senriske pagis fuŝulojn por semi haoson en la plej simpla lingvo el la mondo.

Je lomo de ĉio ĉi, mi respondas ke estus tute malsaĝe akcepti eĉ plej etan ŝanĝon,
eĉ kun plej interesaj kondiĉoj. Kia amara surprizo kiam ni malkovrus kion kaŝis la kato!

Nun mi preparolu la (relativajn) negravaĵojn de via principo. Kio vere puŝis vin al la
penso ke indus tiuj modifoj de nia lingvo, mi ankoraŭ demandas al mi. Ĉar mi neniam
rimarkis ke estas tiom da ajajnoj kaj da igiĝiojn... Kotopooj ja vere multas kaj plimultiĝas (Jes
jes, ekzistas kotopoinoj!).

Ŝercoj flanken, neniam lacigis min aŭskulti Esperanton. Kvankam vi ŝajne sufiĉe
majstras la lingvon, mi miras ke vi ankoraŭ taksas ĝin je monotoneco dum ĝi estas plej
kantanta kaj muzika lingvo! Pli! Malfermu okulojn kaj vi tuj rimarkos ke la ĉefa kaj plej grava
manko de E. estas ... Esperantistoj!

Vi pledas ke vi ne volas enkonduki esceptojn... sed ĝuste tion vi proponas, kaj krome
tio necesigas pli streĉan atenton rilate al ankoraŭ ne aŭdita aŭ jam forgesita kunteksto.
Ŝajnas ankaŭ ke vi neniam legis administraciajn tekstojn aŭ pli ĝuste ke nur ilin vi legis
Esperante! Ĉar E. estas, sene la plej, almenaŭ tre riĉa lingvo, tre supla kaj malrigida (part-
danke al akuzativo!), poeziplena kaj kolorsuka sen perdo de plej grandaj rilatoj prezo por
kvalito kaj simpleco por precizeco.

Mi estas nek profesoro nek lingvisto (poliglotoj ja estas ĉiuj Esperantistoj (*krom
denaska E-isto kiu parolus nenium alian lingvon*) vi entenite). Sed mi fakte jam vidis nenombr-
eban kvanton da E-regular-fuĝantoj rifuzi la tiranecon de dek ses sennombraj senesceptaj
reguloj por rifuĝi en la mildaj brakoj de la kelkaj, ankoraŭ pretervivantaj, esceptoplenaj reguloj
de la franca, angla, germana, rusa aŭ ĉina kaj ilin finlerni en malpli da tempo ol necesas
por tion diri... en ĉiuj lingvoj de la galaksio kaj de la universo!

La libro de G.R. LEDON "Sennaciece tra nia mondo" estas de nun
mendebila ĉe nia libro-servo (60 FF + afranko). Profitu okazon
de broŝurmendo por samtempe peti ĝin.

Bone pripensu ke por efike antaŭenpuŝi la movadon necesas havi firman lingvon kiu ne senĉese iru tien kaj reen, kiel balancilo aŭ pendolo kiu forŝoviĝas apenaŭ oni ĝin uzas, kiel moviĝantaj sabloj! Solidan lingvon kiu sekurigu la lernantojn! Tio kion ĉi tiu lernas nun devas resti taŭga morgaŭ. Penso ke la hodiaŭa leciono estos vana, senutila kaj relernenda estas ja plej efika forpuŝilo de iu ajn lingvolernado.

Blanka ŝapo kaj tuko! Kia estas la tuko? Se ĝi estas ankaŭ blanka necesas la pluralo por la adjektivo : Ŝapo kaj tuko blankaj. Tio estas ja nur ekzemplo sed unuopa adjektivo ĉiam alvokos unuopan substantivon kaj se tia vorto ne estas, oni pensos ke ĝi mankas! La personoj kiuj enigis tiun regulon en E. estis saĝaj kaj spertoplenaj kaj absolute ne inventis ĝin! Ĉu vi konas multajn lingvojn en kiu ĝi ne estas? Mi ne!

Eble vi estas tre rezista persono, ŝtale bakita el karno tiom malmola ke fenestro neniam kapablos malfermi vin! Mi preferas kredi ke via legenda lerteco ŝparos al vi sorton kiu min jam trafis: esti malfermita de fenestro! Via dua ekzemplo estas efektive senduba... kiam oni ĝin legas! Sed parole ne plu videblas la majusklo! Kaj iu kiu esperas tre bone povas lerni vin...

Ĉiu-okaze, eĉ se nur malmulte da kazoj bezonus akuzativon, se necesas pripensi ĉiujfoje ĉu ĝi superfluas ĉu ne, kia galero! Kaj kia perturbo por komencantoj! Multe pli terura ol la regula normala uzo! Kaj ne forgesu ke la fakto de regula kaj laŭ regula uzado aŭtomatigas la teknikan parton de la lingva elpensado kaj liberigas la spiriton por pli kreaĵoj taskoj.

Victor Hugo estas franca verkisto kies nomo ŝajnas jam esperantigita, kaj tio estas erariga ĉar la esperantigita nomo devus iĝi Hugoo kaj Hugoon je akuzativo. Mi pli klarigos per demandoj: ĉu Boulton estas akuzativo de Boulton? Aŭ ĉu vi diras la verko de M. Boultono? Ĉu la vortaro de Gastono Waringhienno? Mi ne plu enĵetu, la korton ŝajne jam mi plenigis! Konkludo: la fuŝo de propraj nomoj aŭ eĉ de antaŭnomoj ne estas fakto de akuzativo sed de lingvo-uzantoj... aŭ eluzantoj?

Efektive rapidlegante ambaŭ asertojn ŝajnas kontraŭdiro. Verbo efektive ne povas esti transitiva kaj netransitiva samkiel ulo povas esti nur granda aŭ eta! Sed kiam vi legas en PIV ke IG sufikso transitivigas netransitivan verbon aŭ IĜ netransitivigas transitivan verbon tio esta tute ekzakta ĉar necesas ne forgesi ke aldono de pre- aŭ sufikso kreas novan vorton kaj ŝanĝas nek signifon nek uzon de la baza vorto. Same por verboj kiuj estas nur aparta klaso de vortoj!

Aliflanke mi devas atentigi vin (kaj ĉiujn legantojn de via artikolo) ke vi erare transskribis vian legadon de PIV: vi skribis (L!83 p28) ke IG netransitivigas kaj ke IĜ transitivigas! Mi asertas ke estas tute la malo: IĜ estas transitiva kaj IĜI netransitiva (ekz. mi iĝis lin foriri kaj li iĝis blanka pro timo!)

IĜ transitivigas verbon kaj IĜI netransitivigas (Mi foririgis lin kaj li blankiĝis pro timo!) Pliajn ekzemplojn vidu en PIV.

Ĉu vi tiom IĜAS stulta ke vi ĉiam bezonas konsulti vortaron por scii ĉu vi deziras plustutiĜI aŭ nur stutiĜI nin ĉiujn?

En viaj ekzemploj se la infanoj pligrandis tio unue signifas ke jam antaŭe ili grandis kaj due ne diras kion faris la kastelo! Kaj se la kastelo grandis kion ja do faris la infanoj, eh! Ke ili tion faris rapide nenion ŝanĝas al via problemoj!

Vortaro estas aro da vortoj dum vortlibro estas libro pri vorto(j); la fakto ke temas pri pluraj vortoj en la libro ne aperas en la nomo eĉ povus esti nur unu vorto en la libro! Sed mi fakte prefere pensas, vidante la vorton vortlibro, pri libro en kiu oni ĝisfundas vortojn, tio estas pri io simila al enciklopedio.

Por blankaĵoj mi komencos per la neĝo kiu blankas supre del' montoj. Ĉu la neĝo iam ne estis blanka? Mi timas ke ne! Neĝo ĉiam estis blanka! Sed ĝi povos iĝi de alia koloro: ruĝiĝi pro sango, bruniĝi pro koto, aŭ nigriĝi pro cindroj! Kaj tiam mi deziras al vi multe da plezuro por reblankigi ĝin!

Por precizeco se vi diras ke io blankas tio signifas ke tio jam estis blanka de certa tempo. Male, ke io blankiĝas signifas ke tio ne estis blanka. ekz: Lia vizaĝo ĝoje ruĝis pro la sinsekvaj ŝercoj sed kiam ŝi subite koleriĝis, li timeme blankiĝis.

Saman rimarkon kiel por akuzativo mi faros: se vi alktimiĝas ne uzi ion kiam tio ne nepre necesas, kiam tio nepre necesos vi ne plu kapablos kaj eble eĉ ne konscios ke tio nepre necesas!

Plie se vi regule ĝin uzas vi ĝin rapide majstros kaj ne plu senĉese bezonos vortaron en la man'!

E. estas la sola lingvo por kiu mi neniam bezonis (eĉ nur teni) lernolibron. Do ne plu taŭzu nin per viaj pigraj nekapablecoj! Ĉu vi iam provis reformi iun fremdan lingvon ĉar ĝi ne taŭgas por vi?

Ĉu vi ankaŭ pripensis la fakton ke kiam ĝi taŭgos por vi ĝi certe ne plu taŭgos por aliaj kiuj certe nevolos relerni pro modifoj?

Do resume se kunteksto alportas pliajn precizigojn, oni ne formetu la bazajn indikojn sen kiuj la kuntekstaj precizigoj povus fariĝi eĉ sensencaĵoj!

E. estas plej malpeza lingvo, eĉ fluga kaj aera, panta interkomprenilo. Nur via menso kaj tiu de aliaj grandpezuloj necesas senbalastigon!

Priatentu ke malakcepto de E. pro akuzativo, aŭ iu ajn laŭdira netaŭgaĵo estas nura masko kontraŭ pigreco kaj malemo. Sinsekve forigu akuzativon kaj aliajn, tiuj personoj tuj trovos ion alian por forpuŝi nian lingvon. Eĉ se vi sukcesus ĝin reverki sen iu ajn regulo, gramatika, sintaksa aŭ alia tiuj samaj personoj ĉiam trovos ion por ne lerni kaj por kritiki...

Ne E. sed E-istoj estas laciĝaj, tedaj kaj monotonaĵaj, kaj se forlasanto diris al vi ke li ĉesas pro la lingvo estis por ne malŝpari vian sentemon!

Rilate al via konkludo mi konservas ĝin: efektive vi proponas plibonigi la lingvon, senhaste priatentu:

PLIBONO ESTAS MALAMIKO DE BONO!

kaj

MODIFOJ KONTRAŬAS DISVOLVIĜON!

Viaj proponoj havas la grandan malavantaĝon naŭzigi min, samkiel plimulton de la denaskaj esperantistoj kaj verŝajne la plimulton de la pristudintaj esperantistoj. Mi insistas pri la fakto ke kunteksto devas resti plia pliriĉigilo de nia lingvo kaj ne indas esti rabatita al nura baza kompresistemo!

Mi tute ne estas fundamentisto nek fundamentulo, eĉ ne fundamentavanto kaj apenaŭ fundamentekvidinto. La nuran konfitaĵkaptohelpan¹ libron kiun mi malfermas kaj posedas estas PIV, same utila por denaska E-isto kiel por aliaj. Mi neniam lernis Esperanton sed se mi devus tion fari pro ŝanĝoj mi certe preferus elspezi mian energion al io alia.

Rilate al prospero de E. neniu ŝanĝo, tiom inda ĝi estus, neniam helpos al prospero de la lingvo. Male! Malstabila lingvo estas malvolonte lernata!

Kion vere necesas ŝanĝi estas la instruado mem kaj la metodoj de varbado, agado, motivigado kaj konservado.

Ekz. tion celas Eurokka promociante Esperanto-Rok-Muzikon kiu plej indas por altiri kaj konservi junularon. Sed tio estas jam alia temo!

Esperante ke vi almenaŭ komprenos kaj eble eĉ taŭge akceptos miajn vidpunktojn, ĝis relego,

Bertrando

1) Kvankam mia patrino neniam kaŝis konfitaĵojn supre de ŝranko! Ĵetu unuan ŝtonon kiu nenion scias pri uzo de vortaro por plialtigi seĝon.

SUR KASEDOJ.... LA VOĈO DE GELAŬTULOJ !

Ĉi-somere, en "Muelejo de Bovilo", naskiĝis kaj efektiviĝis la ideo registri voĉojn de ĉeestantoj. Skeĉoj, poemoj kaj eĉ sceno el "La kalva kantistino" iel utilis por konservi kasede memoraĵojn pri agrablaj momentoj... kaj geamikoj. Sed tio ne restu sensekva iniciato! Ĝin ni pli esploru kaj uzu, ne nur kun surlokaj "laŭtuloj" sed ankaŭ kun ĉiuj pretaj kunlabori en tiu naskiĝanta "kasedo-fako". Ĉiu volontulo bv. registri kaj sendi al ni sian voĉon legantan poemon, anekdotojn...

Aldonu la tekstojn. Ni povos tiel kompili vivoplenan kasedon kun tre varia enhavo kiel ekzemplon de prononcmankoj. Ni multobligos ĝin kaj disvendos etkoste al komencantoj. Ni povus registri eĉ iujn el la ekzistantaj broŝuroj! Ĉu ne estus bone disponi ekzemple "...el la kara infaneco" registrita de la aŭtoro mem, "Memvola servuto" legita de kdo ROL?

Kompreneble, ni resendos niapage la kasedojn al la partoprenintoj post kopiado de la kontribuoj. Dankon pro la donaco de via voĉo!

Marcelo LEEREVELD (Melburno) :

Klariga respondo al informpeto
ate de aŭstralia legantino de L!
pri mia artikoleto en n-ro 80

Min interesis precipe cia aludo pri miaj volapukaĵoj: laŭ mia memoro (mi legis lernolibron pri Volapük kiam mi estis junulo) Zamenhof tute ne uzis iajn ideojn de pastro Schleyer, kontraŭe, li bone sciis la netaŭgecon de Volapük kaj konsekvence klopodis ĝin eviti. Evidente vi konas Volapukon kaj havas lernolibron; mi do estus tre danka, se ci povus pruntedoni al mi tiun lernolibron, por ke mi povu ekzameni (kaj juĝi ĉu ci pravus), ĉu fakte Zamenhof uzis volapukaĵojn (mi mem ja uzas preskaŭ centprocente zamenhofaĵojn, kontraŭe al la plejmulto el la neologismemaj esperantistoj kaj al la plejmulto el la verkistoj kaj lingvistoj uzantaj erarajn gramatikaĵojn).

Estas malfacile klarigi la gramatikajn problemojn per letero. Evidente ci ne posedas la Plenan Gramatikon, kiu multe helpas kompreni la strukturon de Esperanto (kaj de aliaj lingvoj), spite de kelkaj eraroj kaj de multaj nesagaĵaj konsiloj. La plej elstarajn misuzojn gramatikajn menciitajn en mia artikoleto mi klarigis iam en la dua seminario en Adelajdo, kie ci ĉeestis miajn lekcionojn; eble ci hazarde malĉeestis tiun tagon.

Mi en "Laŭte" menciis multajn misuzojn, kaj mi ne kredas, ke ĉiujn el ili ci malkomprenas. Kaj ĉar ci aludis pri "ante" kaj "ate", mi klopodos, kvankam mallonge, klarigi ilin (ili estas menciitaj ankaŭ en Plena Gramatiko).

Nu, ambaŭ "-ant" kaj "-at" estas adjektivecaj sufiksoj uzataj nur kun verboj ("at" nur kun transitivaj verboj). Ambaŭ havas du signifojn: 1°. Ili signifas ambaŭe la prezencon kaj la aktivecon resp. pasivecon de la verbo. 2° Ili signifas nur la aktivecon resp. pasivecon de la verbo (tio ne okazas ĉe "int", "ont", "it" kaj "ot"). Kiam mi uzas "ante" aŭ "ate de" ne kiel sufikso, la signifo estas kiel en kazo 2a: "ante" + aku-

zativo signifas do ke la ago entenata en la antaŭa substantivo (aŭ infinitivo, aŭ adjektivo), kiu ja estas la determinato, estas aktiva kaj ke sekve la determinanto (= la parto post la prepozicio aŭ prepoziciaĵo) estas la rekta komplemento de tiu ago. Ekz. "la manĝado ante la muson" signifas, ke la muso estas la rekta komplemento kaj ke do iu aŭ io manĝas la muson. Komprenoble, oni povas diri ankaŭ "la manĝado de la muso", sed tiukaze "de" povas signifi ankaŭ "ate de" kaj eĉ "el". Simile, "ate de" signifas, ke la ago en la antaŭanta substantivo estas pasiva kaj ke sekve la determinanto, la substantivo sekvanta la prepoziciaĵon, estas la origina subjekto de tiu ago. Do "la manĝado ate de la kato" signifas, ke la kato faras la agon, la manĝadon. Komprenoble oni povas diri ankaŭ "la manĝado de la kato", sed tiukaze "de" povas signifi ankaŭ "ante" kaj eĉ "el" ("la manĝado de (=el) la pudingo", se la musoj manĝas la nuksojn el la pudingo). Anstataŭ "la manĝado de la muso" resp. "la manĝado de la kato" oni povas diri (konsilita de Zamenhof), por senduba klareco, ankaŭ "la manĝatado de la muso" resp. "la manĝantado de la kato", sed tio eblas nur en certaj kazoj. Sciu ke "ante" kaj "ate de" ne uziĝas post vortoj enhavantaj jam la saman sufikson: do oni ne diras "la manĝanto ante la muson" nek "la manĝato ate de la kato", ĉar la uzenda "de" povas signifi nur "ante" resp. "ate de". Sciu ankaŭ ke ili ne uziĝas post substantivo kun mediala signifo, ĉar la determinanto post "de" povas esti nur la subjekto de la mediala ago "manĝiĝi", do nek "la formanĝiĝado ate de (nek "ante") la skribitaj vortoj" (ekz. pro la suno, la akvo aŭ la bakterioj), nek "la formanĝiĝado ate de la suno, la akvo, aŭ la bakterioj", nek "la formanĝiĝado de la suno ktp", sed "la formanĝiĝado de la skribitaj vortoj".

Estas nedubinde ke same kiel la aliajn afiksojn (la "emo", "ebli" ktp) oni rajtas, kaj eĉ alkonsiliĝas, uzi ankaŭ "ant" kaj "at" memstaraj, kiel en "ante" kaj "ate de", sed ankaŭ ekz. ĉe "la anto kaj la ato", "li antas kaj ŝi atas" (aŭ inverse, por ne esti seksisma),

kaj eĉ "dum la torturado la antaro ridis kaj la atinaro (= la inoj torturataj) kriis".

Mi esperas, ke tio klaras al ci. Se ci havas problemojn pri aliaj zamenhafaĵoj (Fundament'afaĵoj) uzataj de mi, aŭ pri la tre malmultegaj leerevelaĵoj (ekz. "kaŭ = kaj/aŭ = kaj aŭ aŭ"), ne hezitu peti mian klarigon.

~~~~~

## EŬROPO EN ATOMCENTRALAJ ĈIRKAŬBRAKOJ

En L! 84 impresis min "ALVOKO EŬROPA POR LA NUKLEA MALIMPLIKIĜO". Bedaŭrinde, la situacio estas eĉ pli danĝera, ĉar alia flanko de Eŭropo prezentas nun ne malpli gravan danĝeron ol Francio. Mi tradukis por laŭtuloj flugfolion, kiu nun estas disvastigata en la tuta Ukrainio. Ukraina Helsinka Unuiĝo (homrajt-defenda organizaĵo, dume ne malpermesita, malgraŭ konstantaj atakoj de partiregata gazetaro) iniciatis la kolektadon de subskriboj kontraŭ plua disvolvado de atomindustrio en Ukrainio. Eble nova sekretario de la komunista partio de Ukrainio, kamarado Ivaŝko, kiu anstataŭis maljunan reakciulon Ŝĉerbickij, aŭdos tiun alvokon kaj provos bari la agresemon de tutsovetiaj ministerioj, kiujn la Ĉornobila katastrofo neniel instruis? Dume mi aŭdis nur lian deklaron pri la Krimea AES, kiu verŝajne ne funkcios (imagu, ke ĝi estas konstruata sur moviĝanta tero!). "Literatura Ukrainio" plenas per protestleteroj kontraŭ konstruo de atomcentralo en Ĉihiniro (historie grava centro de ukraina kulturo) - sed la konstruado pludaŭras...

Oksana

## ALVOKO DE LA PLENUMKOMITATO DE UKRAINA HELSINKA UNUIĜO

### CIVITANOJ DE UKRAINIO!

Super nia tero pendas minaco de neniigo, super nia popolo - fantomo de degenero. Rezulte de krima centralisma politiko de stalinisma-brefnevisma registaro, kiu ignoris interesojn de apartaj respublikoj, suverenaj nur surpapere, rezulte de senrespondeco de lokaj

aŭtoritatoj, kiuj vendis Ukrainion al instancaj mafioj, Ukrainio estas superŝtopita per elektrostacioj, minejoj, metalurgiaj kaj kemiaj uzinoj. Kiuj donas la plej grandan kvanton de venenaj restaĵoj. En Ukrainio, kiu konsistigas nur 2,7 % de la teritorio de USSR, estas koncentrita proksimume 50% de tutsovetiaj atomcentraloj. Krom tio, apud teritorio de Ukrainio, en basenoj de niaj riveroj, troviĝas Voroneĵa kaj Smolenska atomcentraloj.

La Ĉornobila tragedio, kiu skuis la tutan mondon, nenion instruis al la reganta burokrataro: oni konstruas aŭ planas novajn atomreaktorojn en atomcentraloj de Rivne, Novoukrajinsk, Ĥmelnickij, Zaporijĵa, malgraŭ amasprotestoj oni finkonstruas Krimean AES, kaj en la historia centro de Ukrainio oni kaŝe, ŝtelmaniere daŭrigas konstrui atoman stacion en Ĉihirin. Kaj ĉio ĉi okazas nun, kiam Ukrainio jam eksportas elektroenergion en aliajn landojn, dum ŝpar-ema mastrumado, malpliialtigo de industria elektrokonsumado al tutmonda normo montrus la tutan elektroenergion de ukrainiaj AES superflua. Des pli ke nun en multaj ŝtatoj atomenergio estas malpermesita aŭ ĝia produktado malkreskas.

Venis tempo fini ĉi tiun rabistan mastrumadon sur nia tero. Komence oni devigis nin fieri pri tio, ke ni estas tutrusia grenejo, poste - tutsovetia forĝejo, tutsovetia hejtejo. Nun Ukrainio iĝis tutsovetia reaktoro, kaj en perspektivo - tutsovetia, aŭ eĉ tuthomara tombejo. Hodiaŭ ni devas memori al la potenculoj, ke ĉi tiu tero havas sian mastron - la popolon, por kiu ĉi tero ne estas nura rimedo por plenumi industriajn planojn, sed historia lulilo en pasinteco, gepatra domo por feliĉa vivo de nunaj kaj estontaj generacioj.

Glasnosto alportis sur paĝojn de niaj gazetoj la malfruiĝintan veron pri la teruraj tridekaj jaroj. Sed ankoraŭ pli teruraj estos la jaroj, kiuj nin atendas, se ni ĝojos nur pri la vero pri pasinto. Jes, preskaŭ ok milionoj de homaj vivoj forprenis la artefarita malsato de la 33-a jaro - la sango frostas en la vejnoj. Sed la hodiaŭa vero - kie ĝi estas, kial oni volas dormigi ĝin? La vero pri tiuj sep kaj duono da milionoj da homoj, kiuj iradas dume inter ni kaj en proksimaj dek jaroj, kiel opinias kompetentaj sciencistoj, antaŭtempe kuŝas en tomboj? Kaj tio pro ununura reaktoro en Ĉornobilo! Sed oni planis por ni kvindek da ili!

Ukrainaj sciencistoj, verkistoj, sociaj agantoj turnis sin al potenc-havaj instancoj, kaj poste al la 19-a konferenco de la reganta partio kun postulo ĉesigi pluan disvolvon de atomindustrio en

Ukrainio. Estis proponita tutpopola referendumo. Sed, kiel atestas la reago je tiu alvoko, pli ĝuste - la foresto de ia ajn reago - "supre" neniu akceptas l'alvokon serioze, neniu intencas konsulti la popolon. Kaj dumtempe la Ministerio de atomindustrio plirapidigas laboron por funkciigi novajn reaktorojn, novajn atomstaciojn.

Homoj! Ni haltigu la frenezulojn! Ni haltigu dum ne estas malfrue!

Ĉi tiu kolekto de subskriboj iĝu la tutpopola referendumo, en kiu l'ukraina nacio kaj ĉiuj aliaj nacioj, kiuj vivas sur la teritorio de Ukraina SSR, esprimu sian volon al vivo. Nia tero vidis multajn malamikajn invadojn. Niaj prauloj defendis ĝin por ni. Hodiaŭ la historia respondeco pri la sorto de Ukrainio plenpeze kuŝas sur niaj ŝultroj. Ni defendu nian teron de l'senkompataj ungoj de centralismo kaj de nia propra senrespondeco kaj indiferento al nia libero, la sorto de niaj infanoj kaj nepoj, la sorto de nia vundoplena tero.

\*\*\*\*\*

## ĴUS APERIS ĉe SAT-BS :

"40 PAŜETOJ AL PLUA POSEDO", unua legolibro kompilita de L. LENTAIGNE, laŭ ideo de Cl. CAYZAC. 44 paĝoj en A6-formato, 10FF.

40 plej diversaj, mallongaj tekstoj en esperanto, kun - konsultebla per malfaldado de la folio - ilia franca traduko. La kompilinto konsilas al la lernanto laŭte legi kaj relegi ĉiun tekston ĝis ĝi fariĝos preskaŭ parkere konata. Tiel legemo kaj emocii pensu rekte en esperanto kreiĝos ĉe la lernanto, kiu samtempe ricevos gravan provizon da plej kutimaj esprimoj kaj frazturnoj.

Sugesto : kial ne registri nun tiujn tekstojn sur etkosta kasedo ?

Francaj abonantoj de la broŝurservo ricevos tiun broŝuron kune kun la du aliaj preparitaj en 1989 kaj eble ankaŭ la unua de 1990. Ili bonvolu pacienci!

Kribo



## Suno leviĝas ĉe Oriento

Nigras sur Oriento  
Vintra senviva pento.  
Pensis Stan jam pri fuĝo,  
Sed nun ŝanĝiĝas juĝo.

Ĉar lastajn monatojn  
Torturis milico,  
Ĉar ĉesas polico  
Ne plu siajn batojn.

Nun jen sensacio:  
De unu semajno  
Stan iras per trajno  
Al demonstracio...

Siblas en Oriento  
Vipa viviga vento.  
Brulas matena ruĝo,  
Venkos popola muĝo.

Nur dekoj komence,  
Hodiaŭ plurmiloj  
Kun li sen armiloj  
Defias potence.

Jes, for monopolo  
De la kompartio!  
Al demokratio...  
Libera popolo!

Vibras tra Oriento  
Varma vivega sento.  
Morgaŭ en nova Prago  
Helos belega tago.

*Cenon, la 10an de decembro 1989.*



## TENERA REVOLUCIO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Tiel oni nomas demokratian revolucion, kiun startis ĉeĥaj studentoj 17an de novembro 1989 j. Kio okazis?

Tiun ĉi tagon la studentoj de pragaj altlernejoj kaj mezlernejoj preparis manifestacion por festi 17an de novembro - Internacia tago de studentaro. Trankvila manifestacio, dum kiu post festparoladoj la studentoj iris al la tombejo "Vyšehrad" por meti florojn kaj kandelojn al tomboj de K.H. Mácha (ĉeĥa poeto) kaj aliaj naciaj herooj.

Revenante el "Vyšehrad" la marŝantaro de studentoj direktis sin Venceslao-placo kaj sur Nacia avenuo vicoj da specialaj kontraŭteroristaj taĉmentoj de polico baris la vojon antaŭ kaj malantaŭ la marŝantaro de studentoj, kiuj restis ambaŭflanke blokita. La studentoj staris aŭ sidis tere, lumigis kandelojn, kantis kantojn kaj elvokis devizojn "Lasu trairi nin", "Ni havas malplenajn manojn" kaj metis florojn en ŝildojn de policanoj. Post kelke da tempo la policanoj formis "strateton", nur per kiu oni povas trairi for, kaj ili batis la trairantajn studentojn per gum-bastonoj kaj la falintajn studentojn ili piedfrapis kien ajn.

Post la manifestacio restis pli ol 140 vunditoj, pli ol 10 kun gravaj vundoj en malsanulejoj - kun ostrompoj kaj cerboskuoj.

La reago de la tuta studentaro kaj poste ankaŭ de la tuta loĝantaro estis tuja. La studentoj, aktoroj kaj aliaj artistoj tuj organizis protestajn manifestaciojn, komence en Prago, poste en multaj grandaj urboj - precipe kie estas altlernejoj. En Prago preskaŭ ĉiutage amasiĝis la civitanoj sur Venceslao-placo, ĉirkaŭ 200 mil tage, poste ankaŭ sur Letná-plataĵo ĉirkaŭ 500 mil. En nia urbo Olomouc, kie estas universitato kaj multaj mezlernejoj, amasiĝis surplace ĉ. 5-10 mil da loĝantoj apud la statuaro de Sankta Triunuo. Tiujn manifestaciojn organizis la studentoj kun aktoroj de la urba teatro. Oni legis diversajn postulojn de studentoj por la registaro kaj urba nacia komitato. Oni petis tujan foriron de ĉiuj implikitaj registaranoj kaj partianoj, nome s-roj Jakeš kaj Štěpaň. De tempo al tempo pri tio informis pli vere ĉiuj amaskomunikiloj kaj la preskaŭ tuta loĝantaro de Ĉeĥoslovakio unuiĝis kontraŭ la komunista registaro.

Sub devizoj "En unuiĝo estas forto" oni fondis t.n. Civitanan Forumon en ĉefaj landoj kaj en Slovakio la organizaĵon "Publiko kontraŭ perforto". La organizaĵoj kunigas ĉiujn volontulojn por atingi la proklamitajn celojn laŭ program-elvokoj: demokratia ŝtato, sen gvidanta rolo de kiu ajn partio.

Sub tiu premo de publika opinio la registaro rezignis kaj estas nomitaj novaj naciaj kaj federaciaj registaroj, kie estas jam malpli ol duono da komunistoj kaj preferatas membroj de aliaj partioj kaj senpartianoj. La federacia konsilantaro aprobis ŝanĝojn de konstitucio, en kiu oni nuligis la ĉefan rolon de komunista partio en la ŝtato kaj socio. Tio estas granda venko de la tuta loĝantaro.

Kial oni nomas tiun ĉi revolucion tenera? Ĉar ĉio okazis sen armeo kaj polico, nur per forto de grandaj amasoj da manifestaciantoj starantaj kaj elvokantaj devizojn subfenestre de la gvidantaroj.

Ni komencis novan demokratian vojon de Ĉeĥoslovakio, laŭ ideoj de komuna eŭropa domo kaj en spirito de la Deklaro pri homaj rajtoj. La plej proksima estonteco montras, ĉu niaj ideoj, sopiroj kaj petoj realiĝos.

J.P.

## EL LA LAŬTEJO :

Pafu al la tajpinto ! En L! 85, p.36/38, en la artikolo de Lina Gabrielli "La Homoj, ne la Bestoj, faris Auschwitz" preskoboldo trafis la tajpanton. Dufoje estas aludita pri Rudolf Hess, dum ja temis pri Rudolf Höss. Indulgu al li ! (la tajpinto, kompreneble...)

La muro falis ! Multegaj esperantistoj el orienteŭropaj landoj ŝatus legi L! sed ankoraŭ ne povas sendi monon okcidenten. Ĉar nun preskaŭ ĉien eblas sendi nian gazeton, kiuj deziras donaci abonojn al siaj orienteŭropaj geamikoj, tiuj povas tion fari, sendante 40 FF por ĉiu adreso. Antaŭdankon pro ĉies helpemo!

La venonta numero, verŝajne duobla, aperos meze de marto kaj enhavos multajn el la tekstoj, kies publikigo estis ĉi-foje prokrastita. Ni petas la paciencon komprenemon de la kunverkintoj.

Kribo



## 45a Kongreso de SAT-Amikaro

Ĝi okazos de la 14a ĝis la 17a de aprilo 1990 en BONDY, urbo situanta je 10 kilometroj nordoriente de PARIZO.

La kongresaj laboroj kaj aliaj aktivecoj okazos en la urbodomo.

Impona libroservo proponos al la partoprenantoj kaj vizitantoj preskaŭ ĉiujn nun troveblajn librojn en esperanto kaj taŭgajn lernmetodojn kaj propagandilojn por nia lingvo.

Dimanĉon 15an de aprilo, la urbestro inaŭguros Esperanto-straton en nova kvartalo de urbo BONDY.

Marde 17an de aprilo du ekskursoj ebligos al la partoprenantoj vidi la novajn konstruaĵojn de Parizo, viziti la tute novan muzeon de ORSAY, ĝui spektaklon en "LA GEODE", plej granda ekranoparado por kinejo en la mondo (1000 kv. metroj) kaj ripozi ŝipveturante sur la Sejno.

De la 3a ĝis la 21a de aprilo 1990, ekspozicio montras al la publiko kio estas Esperanto. Tie la vizitantoj povos traduki per komputero pli ol 1500 vortojn aŭ esprimojn de la franca lingvo al Esperanto.

Ĉiujn informojn pri la kongreso kaj aliĝilon vi povos ricevi, kontraŭ aŭfrankita koverto al : SAT-AMIKARO 67, av. Gambetta, 75020 PARIS, aŭ

al la Sekretariino de la O.K.K. : K-ino Muguette SADIER, 22 av.P.V. Couturier, Bât.ND, 93000 BOBIGNY. Folio de 16 kongresmarkoj kostas kun aŭfranko por Eŭropa Komunumo 9 FF. Aliaj landoj : 11 FF aŭ 3 I.R.K. (internaciaj respondkuponoj).



## FREINET-PEDAGOGIO

De la 1a ĝis la 11a de aŭgusto 1990, internacia Renkontiĝo de esperantistaj edukistoj (Freinet-pedagogio) okazos en sud-orienta Svedio (Hotell Smaland, je 70 km. nord-okcidente de KALMAR (Svedio). Sin turni al : Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo, F 37540 ST CYR SUR LOIRE, Francio.

\*\*\*\*\*

## IMPRESOJ KAJ PRIPENSOJ POST LA 6a PARIZA FESTIVALO

Ĉi-jare, la alveno de la vino "nova bofole" samsemajnis kun la Pariza Festivalo. Mi frandis la du samtage.

Sabate posttagmeze, fariĝis preskaŭ kutimo, Ĵak Le Puil malfermas la festivalon per kelkaj novaj kantoj (interesaj tekstoj, surprizaj rimoj: Koŝmaluk kun Baŝibuzuk!). Jerzy Handzlik, la bardo sen barbo, finkreis la taŭgan etoson kantigante la publikon ("Sur placo de ĉiela pac" mi neniam povos reaŭdi: li vendis al mi fuŝan kasedon kun la samaj kantoj sur la du trakoj). La Zagreba studenta teatro ne venis, do la "kunveno de birdoj" ne okazis. Anstataŭis ĝin, lastminute, Jomo, juna freŝbakita esperantisto el Toulouse. Denove kantisto, sed en tute alia ĝenro: "dolĉa rokmuŝiko". Kompreneble, kelkaj oldaj grumblemoj ne aprecio; mi jes, ege, kia talento! Bona sinprezento sur la scenejo, multe da humuro, perfekta sinakompano per elektra gitaro, varia repertuaro. Mi prognozozas, ke lia "velura" voĉo (kaj okulo!) altiros la junul(in)aron furore al esperanto. Lia unua disko estas aperonta, antaŭmendu ĉe JEFO.

Post rapida kaj bongusta vespermanĝo (tie mi gustumis la "novan bofole") en la apudaj restoracioj, ni revenis aŭskulti la nerderlandan grupon "Kajto". Profesieca nivelo, vi povas juĝi mem, aĉetante la unuan kompakt-diskon (la unua en Esperanio) de tiu ĉarma kvaropo. Ĉe la fino, la cento da spektantoj

longe aplaudis kaj bisis.

Dimanĉe matene, la Literatura forumo, sub kompetenta animado de la hungaro Oszkar Princz, permesis al la ĉeestantaro rekte aldemandi la ĉefredaktorojn de la revuoj "Fonto" kaj "La Kancerkliniko". La verkisto Lorjak sprite respondis al diversaj demandoj rilate sian verkaron kaj la unuan filmon en esperanto. Sed, kial diable, la akademianoj kunvenis, samhore, en alia parto de la urbo?

La posttagmezo estas malpli bonkvalita. TESPAn prezentis la jam, de mi kaj de multaj, dufoje spektitan teatraĵeton pri vampiroj, kiuj trinkas frostigitan sangon". Sekvis la juna kantisto Aron. Malgraŭ bona brazila muziko kaj lerta svingado de la korpo, li amatoraĉis: ne decas trinki bieron el botelo, antaŭ la publiko, dum oni kantas! La jugoslavaj geaktoroj preskaŭ senmove, en duonmallumo, duonvoĉe (oni pli aŭdis la eksteran trafikon de la strato ol la tekston) teatrumis Brecht. Domaĝe ĉar ili flue kaj belsone elparolas la lingvon.

La lastan spektaklon mi ne ĉeestis.

Konklude, brave por la unua tago kaj ties altkvalita programo, la bona ĝenerala etoso, la ampleksa kaj diversa libro-servo, la komforta kaj malmulte kosta hotelo kaj la trafa gazetartikolo, kiun ĉiu ricevis por aperigo en la lokaj gazetoj. Rapide mi forĝos la dimanĉan posttagmezon kaj la nervozigan preskaŭ seninterrompan krakadon de la kompatindaj seĝoj.

Pri la malglataĵoj ni ne kulpigu la or-

ganizantojn, kiuj faris sian eblon por sukcesigi la tuton. Kulpas tiuj, kiuj faris nenion por helpi ilin. Ankaŭ ni esperantistoj devas malkonstrui nian muron, por ke falu la jam baldaŭ sepdek-jaraj obstinaj baroj. Mi esperas, ke la venonta Festivalo estos kunlabore organizata de "diverspensaj" asocioj kaj tiel venigos pli vastan publikon. Esperanto-kulturo ja meritas tion.

Edmond PLUTNIAK

## E-SEMAJNO EN SÈTE

Gravan sukceson ĝuis en Sète la 12a internacia E-semajno, kiu okazis lastan septembron. S-ino Vierne, kiu organizis tiun laborrenkonton, devis rifuzi aliĝontojn. Pro tio fine de la semajno oni debatis, ĉu oni devus starigi du semajnstagojn jare, sed kiuj zorgus pri tio? De nun vi povas cerbumi, kaj okaze skribi solvon al S-ino Vierne, strato Doktoro Roux en Montpellier. Plie venis samideanoj el dek diversaj landoj, kaj estis vera esperantujo, kie disvolviĝis agrabla fruktodona laboro, variaj vesperaranĝoj, ĉio en bona amika etoso. Plejparto el la ĉeestintoj, ĉefe eksterlandanoj, ŝatis ĝui proksimecon de la mediteranea maro.

Gravan informon mi devas aldoni: tiu staĝo estas agnoskita kiel kleriĝa staĝo laŭ laborleĝo, kaj du junaj fervojistoj partoprenis en la semajno pagita de SNCF.

Koran dankon al tiuj, kiuj zorgis pri tiu sukceso, speciale al

S-ino Vierne kaj al la skipo de kompetentaj kaj zorgoplenaj kursgvidintoj. Ĝis la venonta laborsemajno, fine de aŭgusto 1990 en Habère-Poche en Alpoj.

Rose.

## RADIO FRANCE-ROUSSILLON KAJ ESPERANTO

Radio France-Roussillon (101,6 Mhz) alvokis Renaton LLECH-WALTER, lokan Prezidanton kaj Karlon GERARD, federacian sekretarion, por klarigi al la aŭskultantoj kio estas Esp-o. La elsendo okazis la 6an de novembro je 11h45.

Ni memorigas, ke radio-stacio Fréquence-Sud (98,8 Mhz) elsendas E-kurson trifoje semajne fare de F-ino MANGUINE Jeannine, ges-roj Renato BENAZET kaj Karlo GÉRARD.

## KIEL HELPI al la Red. de L! ...

La kunverkantoj de L!, kiuj posedas elektronikan tajpilon aŭ komputertajpilon ebligantan lasi regulan dekstran marĝenon, de nun povos rekte helpi, se ili sendos siajn verkafojn tajpitaj laŭ la A5-formato de **Laŭte!** (aŭ laŭ duone reduktebla A4). Se ne estos tro da korektoj por fari, mi povos respondi, ne retajpinte la tekstojn. Tamen, des pli zorge kontrolu la ĝustecon de la lingvo! Antaŭdankas,

Kribo

"En L! mankas humuro..." oni diras al ni. Jes ja, ankaŭ la eldonanto tion konsultas bedaŭre... Solvo: konstanta rubriko aŭ pli gajaj artikoloj? Elektu vi!



## LA UNUAJ KUNSIDOJ DE LA TUTMONDISMO EN FRANCO EN APRILO 1990



La ĉiutaga monda aktuala estas, ve, farita el konfliktoj, perforto, malfacilaĵoj, malkomprenemo, kaj, almenaŭ, el malcerteco. Proksimiĝante al la III-a jarmilo, milionoj da homoj en la tuta mondo bedaŭras tiun situacion kaj penas labori por pli da Paco, pli da Justeco, da Frateco.

Kun tia humanisma volo la "Mondcivitanoj" iniciatis organizi en aprilo de 1990, en Francio, la unuajn Kunsidojn de la Tutmondismo, "LA ĜANTA MONDO"

Dum tiuj tagoj partoprenis prelegistoj kiel pastro PIERRE, italoj Claudio GRUA kaj Franco BETTOLI, braziliano Muriel SARAGOUSSI, la germana ekologiisto W. GÜNTHER, S-ro Alain FAURE, prezidanto de Amnesty-Francio, kaj ankaŭ Bernard

BENSON, Edgar MORIN, Michel BEAUD kaj la bulgara profesoro Hristo MARINOV, kaj ĉeestados la plej famaj reprezentantoj de la ekologiista movado, de la pacifista movado, de la federacia movado kaj de la tutmondisma movado, ktp...

La programo okazos jene :

- mardon, la 24an de aprilo : inaŭgura kunsido
- merkredon, la 25an : "FINE, LA PACO ?"
- ĵaŭdon, la 26an : "HARMONIIGI LA DISVOLVIĜON ?"
- vendredon, la 27an : "PROTEKTI LA BIOSFERON"
- kaj sabaton, la 28an : "MONDO POR ĈIUJ" (unuigi, ne unuformigi, per la monda demokratio kaj la federacio de la homaj socioj)

Ĉiuj tiuj manifestacioj okazos en la granda Festeĉambro de la urbodomo de TOURS : estos publikaj prelegoj, publikaj debatoj, ekspozicioj kaj standoj.

Ĉiuj personoj, movadoj aŭ asocioj, kiuj volas partopreni en tiuj kunsidoj povas kontakti la Komitaton de Organizado de la Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo, poŝtfolio 0631, F-37006 TOURS, Francio.

\*\*\*\*\*

Anonceto : Mi, maldiligentulineto (kia bela vorto!) volus korespondi kun iu, kiu instigu min al E-korespondado. Antaŭdankon!...

S-ino Elizabeta FRUDKO, Pana Tadeusza 15 m 69

PL-10-461 OLSZTYN, Pollando (telefono: 33-47-60)

## EKOLOGIO KAJ ESPERANTO

La en Francio nove kreita asocio "EKologio - ESperanto" (EKES), 38 rue Jean Moulin, F-33220 SAINTE FOY LA GRANDE, kiun animas amiko Emilo MAS, atingis unuan sukceson ĉe la ĝenerala asembleo de la Verda Franca Partio en Marsejlo, la 18an kaj 19an de novembro. Eta plimulto adoptis jenan proponon : "Estas proponite al la ĝenerala asembleo, elekti esperanton kiel unu el la internaciaj lingvoj, kaj uzi sisteme ĝin, dum niaj interŝanĝoj kun la aliaj Verduloj, kies nacian lingvon ni ne konas."

EKES celas 1) plibone konigi ekologiajn problemojn al la esperantistoj - kaj ĉefe la pozitivajn solvojn ekzistantajn, 2) diskonigi kaj uzigi esperanton ĉe ĉiaj ekologiistoj.

Dum la 9 lastaj monatoj EKES provis disvastigi E-on en la plimulto de la ekologiaj foiroj, renkontoj, en pluraj regionoj de Francio. Sume 176 lernolibroj estis venditaj, pli ol 8500 flugfolioj estis dissenditaj, preskaŭ mil simpatiantoj indikis sian adreson. Kunlaboris FET, SAT-Amikaro, UFE kaj samideanoj el ĉiuj devenoj.

En jarfina cirkulero EKES liveras du pliajn bonajn novaĵojn :

- 1) La venonta eŭropa kongreso de Verduloj okazos en aŭtuno en Hungario, kie verŝajne estos pli da ŝanco, por ke esperanto estu elektita kiel unu el la oficialaj lingvoj. Sed por tion atingi, necesas ke partoprenu multaj esperantistoj, ankaŭ iuj pretaj helpi por la samtempa tradukado. (Rajtas partopreni ĉiuj simpatiantoj de ekologio...)
- 2) Emilo MAS, subtenate de Christopher FETTES, la iama prizorganto de AVE, konsentis provi revigligi la Asocion de Verduloj Esperantistaj, kaj petas, ke oni sendu al li (ĉe adreso de EKES) ĉiajn dokumentojn (artikolojn, gazetajn raportojn pri ĉiaj ekologiaj, tria- kaj kvara-mondaj temoj, ankaŭ pri edukado al paco, pri ĝemeliĝo, interhelpo, ktp...)

Espereble baldaŭ reĝermos "AVENO" - la iam efemera bulteno de AVE...

Laŭ cirkuleroj de EKES, kompilis **Kribo**.

\*\*\*\*\*

Anonceto : Mi serĉas eksterlandajn amikojn. Mi volus korespondi en Esperanto kun e-istoj, kiuj interesiĝas pri Pollando kaj Poloj. Mi havas 34 jarojn. Mi estas teknikisto. Mi interesiĝas pri sporto, turismo, naturo, libroj, geografio, filmoj. Mi ŝatas aŭskulti distran muzikon, ankaŭ vojaĝi por viziti aliajn landojn.

Weslaw KORZENIOWSKI, ul. Lechonia 7 m 12,

PL-95-100 ZGIERZ, Pollando

## BILANCO DE SAT-BROŜURSERVO en 1989

|                             |                                |
|-----------------------------|--------------------------------|
| Vendoj - provizoj: 24483,72 | Eldonoj: 5606,50               |
| Donacoj 22510,00            | Afranko: 2637,30               |
| Diversaĵoj: 189,00          | Aĉeto de presilo               |
| <u>Enspezoj: 47182,72</u>   | + ties asekuro 71990,20 *      |
|                             | Diversaĵoj, Transĝiroj 9826,36 |
|                             | <u>Elspezoj: 90060,36</u>      |

Jara saldo (negativa): - 42877,64

Antaŭa saldo (fine de 1988): 40331,60

Nova saldo, mankas en la kaso : - 2546,04

\* En tiu sumo 16990,20 restas ŝuldo al pruntedoninto.

Pro la aĉeto de la moderna, sed ege multekosta presilo tute malpleniĝis la kaso. Restas tamen impona stoko da "vendotaĵ" broŝuroj (minimuma valoro: 70 000 FF!), kies ĉi postresta vendado normale devus garantiĝi plufunkciadon de la afero, konfide ke oni ne investu monon en eldonadon de nefacile vendebaj novaĵoj. Tiam ni - almenaŭ provizore - prokrastas la publikigon de manuskriptoj, se ĝi ne estas garantiita per sufiĉa antaŭmendo.

Tio estas ja tute nova principo diktita de plej elementa saĝo. La posedantoj de manuskriptoj bonvolu esti komprenemaj kaj laŭpove cerbumu por helpi en la disvastigado de siaj tekstoj.

Notindas, ke disvendiĝas pli facile originalaĵoj ol tradukoj, kaj ĝenerale pli la broŝuroj utilaj por lerni la lingvon, ol literaturo. Kaj pri "literaturo", la pripolitikaj aŭ similaj tekstoj ĝenerale ne trovas grandan "klientaron".

### Krabo


\*\*\*\*\*

E-PIEDMIGRADO en TRESCLEOUX (Htes-Alpes)

de la 16a ĝis la 21a de aprilo 1990

El simpatia etapkuŝejo de MONT-GARDE, ni stelpiedmigrados tra tiu pitoreska regiono. Partoprenos ankaŭ ne-esperantistoj. Ciutage, membro de la asocio "CHEMINS" konatigos al ni la regionon "Barronies du Buech". Vespere animadoj estas antaŭviditaj (konversacioj, interŝanĝoj, ludoj, kantoj, projekcioj, ktp. La partoprenontoj animos la vesperojn. Ne forgesu viajn muzikilojn, diapozitivajn... Dormosako aŭ lanugaĵo estas deviga, ankaŭ la dorsosaketo por la pikniko. Por aliĝi, skribi al Ginette GABILLON, 32 rue Renault, F-33200 BORDEAUX.

Adreso de la etapkuŝejo: Gîte d'étape du Mont-Garde, TRESCLEOUX, F-05700 SERRES. Tel.92.66.25.72



## LETERO EL NIA MUELEJO

Sub tiu ĉi titolo amiko Gastono intencis - ja plu

intencas! - aperigi regulan rubrikon raportantan pri diversaj aspektoj de la vivo en nia Muelejo de "Cargue Sac" (Kargusak'). Sed, trafite de kvazaŭa gripeto, li ĉi-foje rezignas, jam arigante ideojn por venonta numero. Ne timu pri lia sanstato : li jam rondiras en la muelejo kiel sovaĝa besto ĵus kaptita kaj enkaĝigita. Imagu : funde de l'kanalo, kie kutime ŝvitis li dum la tuta mirinde belaj somero kaj aŭtuno, atendas ĉarumplenon da tero. Kion li elknedas per tiu tero ? Nu, simple digon kontraŭ eventuala inundo de la foje freneziga rivereto "Séoune" (Seŭno) - aŭ komencon de vojeto, kiu eble iam ebligos al ankoraŭ pli frenezaj vizitantoj rondbicikli la bienon !

### Gastono duoble oficas !

Efektive, fuĝinte el Parizo kaj el ties densa haladza trafiko, nia Gastono trafis certe multe pli bonodoran kamparon, sed eĉ pli densan ĝangalon el urtikoj, lapoj, dornaro ekstere, kaj arbaron da arkivaj esperantaĵoj interne. Li tuj malkovris sian duoblan oficon : pejzaĝisto kaj dokumentisto li do estos !

### Pejzaĝo

Kiuj neniam vizitis "Cargue Sac" certe ne povas imagi la aron da eblecoj, kiujn ĝi proponas al ĉies entreprenemo. Ekzistas ja ĉe homoj diversaj emoj. Iuj ĝuas la akvon, aliaj plezuriĝas sur kultivebla grundo aŭ en kontakto kun arboj kaj arbustoj. Gastono tuj enamigis al la rivereto kaj al la kanaloj, iam utilaj por la funkciado de la muelejo. El la rivereto Seŭno li elŝovelis amasegojn da sablo kaj gruzo. Per tiu materialo eblas masoni aŭ plibeligi korton

kaj aleojn. La kanalo estis grandparte ŝtopita per sekigita ŝlimo kaj densa vegetaĵaro. Armite de branĉotondilo, ŝovelilo, ĉarumo, Gastono remodlas la elir-kanalon. Ha, kio estas la elirkanalo ? Nu, ŝajnas, ke ni efektive forgesis precizigi esencajn nociojn : la alven-kanalo konkukis la akvon de la baraĵo (kie oni sin banas!) ĝis la muelejo, kie ĝi movis pezegajn muelradojn por prepari farunon, kio estas tre banala okupo de muelejo, ĉu ne ? Dume, la elir-kanalo redonis la uzitan akvon al Seŭno kelkajn centojn da metroj poste. Ĝuste tiun elir-kanalon prizorgas Gastono. Kial ? Nu, pro la sama antaŭzorgo kontraŭ eventuala inundo prialdita supre. Per purigita kanalo la inunda akvo pli facile forlasos la piedojn de la muelejanaj ! Vi konstatas, ke akvo obsedas nin. Strange, ĉar de multaj monatoj regas neniam antaŭe spertita sekeco. Tipa kamparano ĉiam reagis logike : se ĝis nun ne pluvis, do nepre iam pluvos. Kaj li preparas sin por pluvo meze de plej seka vetero !

### Dokumentaro

El Parizo Gastono venis kun sia tuta E-arkivaro : libroj, gazetoj, raraj dokumentoj antaŭmilitaj. Li ĉion donacis al la senĉese riĉiĝanta biblioteko mueleja. Sed kiel orientiĝi meze de tiu verda papera ĝangalo ? Certe vizitanto povus pli facile promeni en la kanalo purigita de Gastono ol tra la bretaro kaj tirkestaro de la biblioteko ! Gastono decidis ordigi kaj listigi, sed vintre, aŭ kiam la vetero malpermesos labori ekstere. Se vi konas Gastonon, vi ne miros, ke li ĝis nun ĉiam preferis la subĉielan aktivecon ol la baraktadon meze de presaĵoj. Tamen, li jam zorge kaj kompetente starigis listojn por la plej utilaj dokumentoj : lernolibroj, vortaroj...

Alveno de amasego da belaj libroj donacitaj de Deniza ŝajne bremsis la dokumentistaron. Supersutite, des pli ke ni ankoraŭ ne komencis elfosi la gazetojn, ni atendas... la printempan pluvon !

La muelejanaro.

\*\*\*\*\*

Se tie ĉi estas kruco, tio signifas, ke L! ankoraŭ ne ricevis vian reabonon. Dankon pro la "ordigo"!